

VALO

*Esperanto
kaj
literaturo*

Al F. Faulhaber,
mia antaŭulo kaj inicinto
kiel sekretario de la Literatura Komitato

Cercle espérantiste de l'Agenais
"Laŭte!" * F 47340 Laroque Timbaut
1986 * 3 FF

SAT-BROŜURSERVO

La dua parto de tiu ĉi artikolo estis kontrolita de K-do J. van Scheepen, al kiu mi ŝuldas grandan dankon. Plie, li donis al mi plurajn ideojn akiritajn dum longa spertado kaj pripensado, kune kun K-doĵ Degenkamp kaj Faulhaber, en la kadro de la Literatura Komitato de FLE. Tiujn ideojn mi adoptis kaj enkondukis, foje sensânĝe, en mian tekston.

I. Kulturo, arto, literaturo

1. Etna originaleco

Per la artoj ĉiu popolo esprimas sian propran kulturon. Kiam unu popolo superas alian per pli altnivela civilizacio, la alia admiras kaj imitas ĝiajn modelojn : en antikveco disvastiĝo de la helena arto en la tuta roma imperio ; en mezepoko, influo de la araba en Hispanio kaj okcidento. Kiam etendiĝis la kristana religio, tra tuta Eŭropo starigis samstilaj katedraloj, unue romanikaj, poste gotikaj. Jen venis la Renesanco, poste sinsekvaj stiloj, kiel la baroka, la klasika, la romantika. Tiuj artaj movadoj, jam internaciaj, ne konsistis el simpla reproduktado de rigidaj ŝablonoj : ĉiu popolo alportis en la ĝeneralan interpenetradon sian apartan kontribuon. La formoj, kvankam similaj, variis en la detaloj, per kiuj sin distingas diversaj regionaj stiloj.

En la 19-a kaj 20-a jarcentoj, la eŭropaj artistoj malkovris kaj komencis ekspluati la riĉigajn modelojn el Ekstrem-Oriento, el Afriko, el Amerindio, el Oceanio. Eŭropaj kaj amerikaj komponistoj esploris la muzikon de la negroj el Ameriko kaj Afriko, tiun de la azianoj, de la brazilanoj, de la andanoj. Samtempe la artistoj el ekstereŭropaj landoj ekimitis la eŭropajn. Per tiuj reciprokaj pruntoj kaj interŝanĝoj pliriĉiĝas la komuna trezoro de la homa kulturo, kaj la artoj celas al internacieco. Ankoraŭ ne al sennacieco : adoptante fremdan formon, ĉiu popolo asimilas ĝin, kaj stampas ĝin per la sigelo de sia propra genio.

Arkitekturo, precipe de loĝejoj, varias laŭ la lokaj cirkonstancoj : geografio, klimato, konsisto de la rokoj, okupo

de la loĝantoj. La nuna ĝeneraligo sur la tuta planedo de samtiraj betonaj amasloĝejoj ne signifas laŭdindan progreson.

La skemo de la monumentoj respondas al normoj religiaj aŭ kulturaj, kiuj ne estas samaj en ĉiuj landoj.

Ĝis la 18-a jarcento en Eŭropo, ĝis la 20-a en aliaj mondpartoj, skulptistoj kaj pentristoj aŭ obeadis al striktaj reguloj, aŭ prezentadis precize kodigitajn simbolojn, aŭ ĉerpadis sian inspiron el tradicia temaro : religio, mitologio, historio. Anoj de aliaj gentoj aŭ de aliaj kulturoj, kiuj ne konas tiujn regulojn, tiujn simbolojn, tiun tradicion, ne povas plene kompreni la mesaĝon metitan en la verkoj de tiuj artistoj.

Ankaŭ muziko, - eĉ inter la popoloj, kiuj ludas samajn instrumentojn, uzas saman gamon kaj saman notsistemon - ofte prezentas etnan karakteron.

2. Universaleco

Se do la plena ĝuado de artaj verkoj necesigas ian edukitecon, tamen neinicito ne estas tute surda al ilia voĉo. Fronte al artaĵo, laiko eble ne kapablas formuli kleran analizon, sed li sentas impreson de belo aŭ forto, intereson plezuron, emocion. Ne necesas doni ekzemplojn : en ĉies penson venas, spontanee kaj abunde, nomoj de monumentoj, skulptaĵoj aŭ pentraĵoj. En kiu ajn penso aŭ sento konkretigita per mano de homo, eĉ malproksima en spaco aŭ tempo, ĉiu homo rekonas esprimon de similulo. Kaj oni prave diras, ke muziko estas internacia lingvo.

Ĉu do ĉiuj artoj estas, samtempe, speciale gentaj kaj universale homaj ? Iurilate ekzistas escepto.

3. Aparteco de la literaturo

Literaturo - same kiel retoriko - havas inter la artoj apartan karakteron, nome nepran kunligitecon kun la idiomato. Al kiu ne posedas tiun ŝlosilon, ĝi restas nepenetrebla. Por komuniki ĝiajn produktojn al alilingvaj homoj, necesas aŭ instrui al tiuj ĉi la lingvon de la originalo, aŭ uzi tradukon.

Kiel perilo inter naciaj literaturoj, nia internacia lingvo havas grandan rolon por ludi. Kaj por helpi al kreado de sennacieca kulturo, ĝi estas neanstataŭebla.

4. Sennacieca kulturo

Ni iomete haltu ĉe tiu ĉi nocio.

Kiel konstruado de ĉielskrapaj turegoj aŭ unuformigado de la kostumoj en ĉiuj klimatoj, tiel sennacieca kulturo ne estus dezirinda, se ĝi limiĝus al nura forigo de ĉiuj apartaĵoj. Ĝi konservu ilin, se nur ĝi ĉiam akcentas, sub la supraĵaj diferencoj, tra la diverseco de la formoj, la fundon komunan al la tuta homaro.

La provencaj teatraĵoj kaj filmoj de Marcel Pagnol estas tipe regionaj. Multaj nuancesprimoj ne estas plene komprenataj de francaj spektantoj el aliaj regionoj, kaj la parizanoj ofte ridas mistrafe pro la marsejla parolmaniero. Tamen tiuj teatraĵoj kaj filmoj estas ŝatataj ne nur en Parizo, sed en Berlino, en Tokio. Kial? Ĉu ne tial, ke sub la ŝelo kuŝas kerno, kiu elmontras la profundan universalecon de la homaj menso kaj koro?

Kiam Karlo Chaplin lokigis la agadon de sia "Diktatoro" en imaga lando, kie la butikaj ŝildoj estas skribitaj en esperanto, ĉu tiu ideo fontis el pura fantazio? Ĉu li ne volis per tio montri kaj emfazi, ke la nazia barbareco, kiu iam furiozis en Germanio, povus ankaŭ flori en kiu ajn alia lando, se tie troviĝus favoraj cirkonstancoj? Ĉar stulteco kaj krueleco, ho ve! ne estas privataj propraĵoj de unu gento: ili apartenas al la homa naturo en la tuta mondo, - same kiel, feliĉe, la aspiro al bono kaj belo.

Homoj ni estas; nenio homa estas al ni fremda. Vole-nevole ni dividas la propraĵojn, ĉu bonajn, ĉu malbonajn, de la homeco. Al la tuta homaro estas donita la heredaĵo de ĉiu nacia aŭ regiona kulturo, kaj ĉiu gento pliriĉigas la komunan trezoron per originalaj donacoj.

La plej grandaj verkistoj, kvankam ili uzis nacian lingvon kaj priskribis tipe gentajn personojn, scipovis travidigi la ĉiean kaj ĉiaman homecon. Iliaj verkoj, juveloj de naciaj literaturoj, havas eminentan lokon en la sennacieca. Tion bone komprenis Lanti la sennaciisto, kiam li esperantigis verkojn de Voltero.

La nunaj etnologoj, studante la kutimojn kaj morojn de primitivaj triboj, elfosis komunajn radikojn, kiuj pruvis la konstantan esencon de la homa menso. Nia epoko alportas ion plian. La transportoj fariĝas pli kaj pli rapidaj kaj komfortaj. La teknikoj evoluas en akcelata progresado, kiu tuŝas pli kaj pli multe da terpartoj. Tiuj fenomenoj kreas procezon de unuformigado. Ili ŝanĝas kaj unuigas la laborprocedojn kaj niveligas la vivkondiĉojn de industriaj kaj kulturaj laboristoj. Vojaĝoj kaj migradoj proksimigas kaj ia-

foje kunmiksas tiujn homojn, kiuj estas ĉie alfrontataj al similaj problemoj. Inter ili la modernaj komunikaj rimedoj amase disvastigas samtempajn informojn. Ĉio kunhelpas al naskiĝo de tutplaneda kulturo, malgraŭ la persisteco de la lingvaj baroj. Tiom pli inter tiu malplimulto, kiu jam liberigis el la bremsado de tiuj baroj, nome la praktikantoj de la lingvo internacia.

La modernaj artoj spegulas tiun evoluon. La nuntempa literaturo pritraktas temojn rilatajn al la nunaj prizorgoj de la teranoj, speciale al problemoj komunaj al la tutmonda junularo. Ekzemple : tri danaj romanoj esperantigitaj de Gudrun Riisberg : "**Kit vivas**", "**Bodil kaj la bando**", "**Venis viro**". En la esperanta traduko tiaj temoj ricevas tute sennaciecan akcenton.

Jen estas grundo larĝe malfermita al niaj originalaj verkistoj : ili ĝin ekspluatu kaj tiel kreu, pere de sia esprimilo jam preta, provita kaj hardita, vere sennaciecan literaturon.

II. La esperanta literaturo

1. La ekzemplo de la Majstro

Ĉu ni ĝuste taksas la amplekson de la verkaro de Zamenhof ? Paralele kun kuracista studado, krei planlingvon forte strukturitan kaj vivipovan, jen estis jam giganta tasko. Ĝin plenuminte, li ne haltis tie. Li devigis sin al alia grandega entrepreno : traduki verkojn de Ŝekspiro, Moliero, Goeto, Ŝillero ; de Heine, Gogol, Eliza Orzeszko, Ŝalom Aleĥejm ; kaj la tutan **Malnovan Testamenton**...

El tiu tuto, rimarkinda proporcio da teatraĵoj. Evidente Zamenhof atribuis apartan valoron al la parolata lingvo. Jam en la unuaj kongresoj estis prezentitaj sur scenejo komedio (**Georgo Dandin**) kaj tragedio (**Ifigenio en Taŭrido**). Inter liaj originalaj verkoj, pluraj poemoj (**La Espero**, **la Vojo**, **Preĝo sub la Verda Standardo**) estas destinitaj por kanto aŭ deklamo pli ol por nura lego ; kaj ni povas imagi la efekton de liaj kongresaj paroladoj, en la silento kaj kvazaŭ religia atento de fervora aŭskultantaro.

De la komenco ĝis nun, bonaj esperantistoj sekvadas la spurojn de la iniciatinto, tradukante majstroverkojn de diverslingvaj aŭtoroj (romanojn, poemojn, teatraĵojn). Paralele la parollingvo floradis en la prelegoj de la someruniversitatoj, en la dramecaj debatoj de iuj kongresoj de SAT aŭ de UEA, en la viglaj diskutoj ĉe la Pariza Labor-

borso, en la kabaretaj vesperoj : Verda Kato, Bolanta Kaldrono, Tri Koboldoj. Certe, elokventaj oratoroj kiel Privat kaj Lapenna, akraj diskutistoj kiel Lanti, pikaj kanzonistoj kiel R. Schwartz kaj Flego forte influis la evoluon al pli granda vivanteco de la parolata lingvo.

2. Kial traduki ?

Demando : Ĉu estis vere necese, ĉu ne superflue esperantigi mondfamajn, universale disvastigitajn verkojn ? Sofoklo, Danto, Ŝekspiro, Cervanteso, Moliero, Voltero, Goeto, Ŝillero, Tolstojo... **la Biblio, la Korano...** estas jam legeblaj en ĉiuj lingvoj.

Tamen ne estas dubo. Per tradukoj Zamenhof eksperimentis, elprovis sian lingvon, faris ĝin pli fleksebla, pli riĉa, pli taŭga por distingi subtilajn pensnuancojn kaj esprimi delikatajn sentojn. Grabovski, Kabe, Boirac kaj ĉiuj sekvintoj daŭrigis tiun treege utilan ekzercadon, dank'al kiu, kiel prave diris Baghy, "la tradukita literaturo rafinas la lingvon".

Krome, la tradukoj prezentas nesupereblan intereson : ili estas faritaj de verkistoj, kiuj bone posedas esperanton, kaj estas ofte el la sama nacilingva deveno kiel la aŭtoro de la originalo. Tial ili povis servi kiel komparilo. Tiurilate elstaras kiel modelo la "**Hamleto**" de L.N.M. Newell : oni ja scias, ke ĝi helpas ne nur fremdajn, sed eĉ anglajn studentojn plibone kompreni la ŝekspiran tekston.

Plie, Zamenhof donis al esperanto ĝiajn nobelreferencojn, dotante ĝin per majstroverkoj apartenantaj al la homara heredaĵo. Liaj posteuloj daŭrigis kaj daŭrigas lian iniciaton. **Hamleto, Faŭsto, la Dia Komedio**, ks. estas brilaj juveloj en la kultura posedaĵo de la tuta homaro. Ili do havis antaŭdestinitan lokon en la komuna trezoro de la mondlingva literaturo.

La aro de la tradukitaj aŭtoroj staras kiel galerio de familiaj portretoj, en kiu iom orfe traktitaj estas gigantaj figuroj kiel Homero, Platono, Vergilio, la franclingvanoj Rabelezo, Viktor Hugo k.a.

Tamen mi estis informita intertempe de pli bone dokumentitaj kamaradoj, ke jam en la frua epoko de nia lingvo aperis la "**Iliado**" de Homero en traduko de Kofman laŭ rusa kaj germana traduko. Kaj inter la du militoj la "**Odiseo**" de la sama aperis en bona traduko el la originalo de W.J.A. Manders. La "**Eneido**" de Vergilio tradukita el la latina originalo, aperis en 1906 (tradukita de Vallienne).

En la "Enciklopedio" G. Waringhien notas, ke kvankam fidela traduko ĝi ritme estas malbone adaptita. Antaŭ 1914 aperis en la kolekto de Internacia Socia Revuo, kiel volumetoj 9-12 de tiu serio la unua parto de "La Mizeruloj" de V. Hugo. Ni ne havas ĝin sub okuloj kaj ne povas prijuĝi la valoron de la traduko. "Gargantua" kaj "Pantagruel" de Rabelezo estas ĵus fintradukitaj, tre lerte, de S-ro Motillon (la manuskripto en 1977 ankoraŭ ne trovis eldoniston).

Krom tiuj elstaraj lumturoj, ĉiu nacilingva literaturo provizas nin per aro da libroj eble duarangaj, tamen sufiĉe altvaloraj por meriti tutmondan famon. Fakte, ankaŭ tiuj estas jam tradukitaj en la grandaj kulturlingvoj - sed ne ĉiuj : ĉar en la pli malvaste uzataj, en la idiomoj de popoloj malgrandnombraj, kun malmultaj legantoj, eldono estas nesufiĉe profitdona.

Tiu kampo estas kultivinda de niaj tradukistoj ; kiam esperanto estos sufiĉe disvastiĝinta, ĝia tutmonda legantaro estos pli multopa ol tiu de kelkaj etpopolaj lingvoj. Jam nun - ĉar niaj eldonistoj estas malpli profitcelaj ol la grandaj nacilingvaj firmoj - , ili produktis kaj daŭre produktas ne neglektindan kvanton da tiaj tradukoj. Sufiĉas foliumi katalogojn de esperantaj eldonoj por eltrovi plurajn dekojn da aŭtoroj el diversaj lingvoj, kun pluraj centoj da titoloj. Esperinde tiu produktado plu disvolviĝos, spite la ekonomiajn malfacilaĵojn, kiuj nuntempe pligraviĝas.

3. Esperantaj originaloj

En la enkonduko al sia tre interesa libreto "Nia originala prozo", Heide Apolloner citis jenajn vortojn de Julio Baghy, el kiuj mi jam ekstraktis frazon : "Kvankam la beletristika valoro de niaj originalaĵoj ofte ne atingas la nivelon de mez-kvalitaj naciaj verkoj, tamen en la unuaj respeguliĝas io propra, karakteriza, io distinginde sendependa, kio formas la senkernon de la esperantista literaturo, kaj kio donas specialan guston al la maturiĝinta verko. La tradukita literaturo rafinas la lingvon, sed la originala nutras ĝin kaj certigas ĝian vivantecon".

Jam en la tradukoj estas konstateble, ke, krom detaloj apartenantaj al folkloro aŭ al "loka koloro", la bonaj tradukistoj scipovis forĝi tre homogenan lingvaĵon ; en ĝi pli sentiĝas la persona stilo de la aŭtoro ol lia nacilingva deveno. Sperta leganto povas diveni : tiu teksto estas de Kalocsay, ĉi tiu de Waringhien ; sed ne venos al li la penso diri : tiu estas verkita de hungaro, ĉi tiu de franco.

Ke "la beletristika valoro de niaj originalaĵoj ofte ne atingas la nivelon de mezkvalitaj naciaj verkoj", estas facile kompreneble. En ĉiu nacia lingvo aperas ĉiujare grandega kvanto da presitaĵa papero, subskribita de multopa armeo da verkistoj. Laŭ la leĝo de probablokalkulo, en tiel granda provizo nepre devas troviĝi kelkaj bonkvalitaj produktoj. En ĉiu generacio aperas nombro da ŝatindaj talentoj, en ĉiu jarcento kelke da aŭtentaj genioj - ja ne multe. Se kompari laŭproportie, ne estas mirige, ke en nia mizera stoketo malofte troviĝas perlo. Tamen, se taksi la mezan kvaliton, eble la komparo ne estus por ni tro humiliga.

Sendube, ankoraŭ ne naskitaj estas nia Homero kaj nia Ŝekspiro, kaj eble neniu el niaj verkistoj atingis la nivelon de Edgar Poe aŭ de Maupassant. Cetere, la genioj ĝenerale estas rekonitaj nur post sia morto, kaj la rimarkindaj talentoj estas efektive rimarkitaj nur tiam, kiam sufiĉa nombro da legantoj povis ilin apreci. Jen estas jam malfavora cirkonstanco por niaj aŭtoroj de originaloj. Malmultaj el la esperantistoj kutime legas beletraĵojn, kaj niaj plej grandkvantaj eldonoj neniam proksimiĝas al la centmiloj da ekzempleroj, kiuj estas kutimaj ĉe eĉ senvaloraj naciolingvaj libroj.

Ni tamen povas sentime aserti, ke inter la originalesperantaj verkistoj jam sin montris kelkaj talentuloj. Mi emus nomi ĉiujn menciitajn en la libreto de Heide Apolloner (pli ol cent, el kiuj estus embarase provi elekton, kaj temas nur pri prozistoj : al tiu listo devus aldoniĝi la nomoj de pluraj, kiuj verkis nur verse).

Tiujn homojn ni salutu kiel tiujn de kuraĝaj merituloj. Ili ofertas al esperanto tempon, laboron kaj talenton, kiuj eble ricevus pli profitan rekompencan, se ili dediĉus sin al sia gepatra lingvo. Ja, miaopinie, pluraj el iliaj verkoj honorinde figurus en nacilingva literaturo, kaj havigus al ili multe pli vastan publikon, ol kian povas liveri nuntempe la tutmonda esperanta legantaro. Ili estas pioniroj, al kiuj ni ŝuldas omaĝon kaj dankon. Mi mencias tute hazarde, kaj neniel limige : Edmond Privat (**Vivo de Zamenhof**) ; Julio Baghy (**Printempo en la aŭtuno**) ; Ferenc Szilagy (Koko krias jam) ; Sandor Szathmari (**Vojaĝo al Kazohinio**) ; Cezaro Rossetti (**Kredu min, Sinjorino!**) ; J.H. Rosbach (**Disko**) ; A. Fernandez (**Senĝenaj dialogoj**) ; inter la poetoj : Hilda Dresen, K. Kalocsay, J. Baghy, Marjorie Boulton, W. Auld, Urbanova... Mi kiel franclingvano iafoje bedaŭris,

ke Raymond Schwartz ne tradukis france sian "**Kiel akvo de l' rivero**", kaj J. Ribillard sian "**Vivo kaj opinioj de Majstro M'saud**", kun la mencio : traduit de l'esperanto.

Sed, entute, tio estus eraro. Tio kaŭzus misuzon de talento kaj malŝparon de tempo kaj de materiaj rimedoj - same kiel la tradukado de unu nacia lingvo en plurajn aliajn.

"La celo, al kiu kuraĝe ni iras", estas certe malproksima. Ĝi malforte "tra densa mallumo briletas", sed ĝi estas nia celo. Ni daŭre tenu ĝin en nia rigardo, ni strebadi al ĝi per nia tuta forto, "nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante".

En la kampo de literaturo, tiu celo estas jene difinebla :
- por ĉiu nacilingva verko, unu sola traduko : esperanta.
- por ĉiu esperanta, unu sola formo : la originala.

Tamen, koncerne tradukojn, ni devas nuanci tiun tro rigidan formulon.

4. Kiel traduki ?

En scienca aŭ teknika traktato ĉiu vorto havas precize difinitan signifon ; en alia lingvo povas esti nur unu valida traduko, nome tiu, kiu ĝuste reproduktas tiun signifon. Por tio, du kondiĉoj necesaj kaj sufiĉaj. La tradukanto devas posedi :

- 1-e, fundan konon pri la koncerna temo ;
- 2-e, ekzaktan konon pri la preciza leksikona interrespondo de la fakaj terminoj en la du lingvoj.

Ne tiom facile !

Pro la konstanta evoluado de la sciencoj kaj la akcelo de la progresoj, la terminaroj, en ĉiuj lingvoj, estas ofte ne precize normigitaj. En esperanto aparte, ni posedas ankoraŭ nur elementajn fakvortarojn, kaj bezonas multe pli ellaboritajn. Sed almenaŭ la celo estas klara.

*

Alie staras la demando en la kampo de beletra.

Tie la vortoj estas tradicie ŝarĝitaj de emocia enhavo kaj ĉirkaŭitaj per nebulo da kulturaj asocioj, pli-malpli variaj inter diversaj lingvoj. Necesas malfacila, delikata elekto. Tie intervenas la personeco de la leganto kiel tiu de la aŭtoro.

Beletra verko estas komparebla kun skribita muzikaĵo. La komponisto surpaperigis notojn, indikis takton, fortecon, nuancojn. En la tiel difinita kadro, foje tre strikta, ĉiu instrumentisto aŭ kantisto tamen alportas sian propran

komprenon kaj senton. Kiel ajn fidele al la skribita komponaĵo, ili redonas ĝin en formo rekreita laŭ sia persona temperamento. Simile pri poemo aŭ teatra peco. Sama deklamaĵo el la buŝo de Mounet-Sully aŭ de lia frato Paul-Mounet sonis tute alie. Talenta aktoro markas rolon tiel forte per sia propra stampo, ke oni prave diras, ke li "kreis" ĝin. Tiusence la rolo de Cyrano de Bergerac en la teatraĵo de Edmond Rostand estis "kreita" de Coquelin, kaj poste "rekreita" sinsekve de Lucien Guitry kaj de ĉiuj posteuloj.

Iuj muzikamantoj konservas en sia diskoteko plurajn ekzemplerojn de unu sonato ludita de diversaj solistoj, de unu lido kantita de diversaj kantist(in)oj, de unu simfonio direktita de diversaj orkestro-gvidantoj. Ili amas aŭskulti sinsekve kaj kompari la diversajn interpretojn. Inter ĉi tiuj varias la tembro, la ĉizado de la frazoj, la etoso, kaj ofte estus malfacile diri, kiu estas la plejbona : la elekto dependas de la adoptitaj kriterioj, kaj de la sento de la aŭskultanto, en la momento mem de la aŭdado.

Pri beletro, ĉiu leganto estas mem, samtempe, kvazaŭ kantanto aŭ ludanto kaj aŭskultanto. Tradukanto estas unue leganto. Li ne povas ne meti en sian tekston iom el sia temperamento.

Plie, du lingvoj estas kompareblaj al du voĉoj aŭ instrumentoj. Ĉiu havas proprajn tembron kaj sonoron. Lido de Ŝuberto transponita de baritona en sopranan registron ricevas alian karakteron. Eĉ en sama registro, sama melodio ludata ĉu per violono, ĉu per fluto, estas iel diferenca. Lingvoŝanĝo efikas kiel ŝanĝo de instrumento.

Kaj tradukanto, ju pli talenta, des pli markas la tekston laŭ sia persona stampo. Kiam Vagnero transskribis por piano la orkestran partituron de la Naŭa Simfonio, plej admire kaj respektate, certe lia transskribo estis diferenca de tiu, kiun farus iu alia : ĝi spegulis ja unue la genion de Betoveno, sed ankaŭ iagrade tiun de Vagnero.

*

Neniu traduko povas esti absolute fidela. Pli ĝuste, ne eblas difini, kio estas en tiu senco fideleco. Ĉu laŭvorte transskribi ? Ofte neeble, pro la idiotismoj. Iafaĵe du lingvoj havas ekvivalentajn idiotismojn, sed ne ofte. Krom tio, laŭvorta traduko ĝenerale ne redonas la paŝadon, la spiradon, la koloron de la originalo. Kiu estas plej bona traduko : ĉu tiu, kiu plej respektas la signifon de la vortoj (sed ofte staras la demando : kiel elekti inter pluraj sinonimoj ?

Tiom pli malfacile, ke preskaŭ ĉiam, du vortoj ŝajne inter-respondaj en du lingvoj ne kovras ekzakte la saman areon de signifoj kaj sencoj) ; ĉu tiu, kiu plej elvokive imitas la stilon de la aŭtoro kaj rekreas la etoson de la verko ?

Cetere, kiel sondi kun certeco la intiman penson de la aŭtoro, liajn konsciajn intencojn, liajn duon- aŭ nekonsciajn impulsojn ? "Traduttore, tradittore" (*). Tradukisto, kiel eble kapabla, rezignu pri neebla perfekteco.

*

El la antaŭparolo al sia "**Hamleto**", Newell klare kaj konvinkige pravigas la ekziston de pluraj tradukoj de unu verko. Li prave asertas : Neniu traduko estas definitiva. Li montras ankaŭ, ke nova traduko ne anstataŭas la antaŭa(j)n, kiu(j) konservas tutan sian valoron. La brilo de la Zamenhofa "**Hamleto**" ne paliĝas apud tiu de Newell ; la "**Fabeloj de Andersen**" estas belaj en la traduko de Zamenhof kaj en tiu de Ib Schleicher ; kaj se iam aperos nova "**Faŭsto I**", tiu de Barthelmess neniom perdos el sia valoro kaj beleco.

*

Tio estas vera pri prozo, ankoraŭ pli pri versoj. Versojn oni povas traduki ĉu proze, ĉu verse. En la unua okazo oni celas fidelecon al la signifo de la vortoj. En la dua, la neceso konservi versan ritmon, foje eĉ rimojn, nepre kondukas al pli granda libereco en la elekto de la vortoj kaj esprimoj. Se la tradukanto estas vera artisto, majstro kiel Kalocsay aŭ Waringhien ; sufiĉe klera por science esplori la originalon ; sufiĉe sentema por kapti la plej delikatajn nuancojn ; sufiĉe reganta la rimedojn de nia lingvo por esprimi tiujn nuancojn ; sufiĉe por elegante solvi la multajn prozodiajn problemojn : tiam la rezulto estas rara ĝuo por la leganto. Eĉ tiuj, kiuj scipovas legi la originalon, trovas plezuron kaj instruon en "**La Ĥimeroj**" de Gérard de Nerval esperantigitaj de Waringhien. En la antaŭparolo estas unu peco, "**La Cidalizoj**", en du apudmetitaj tradukoj, unu de Waringhien, unu de Kalocsay : kiu estas la plej bona ? Sed kiu povus rivali kun tiuj du poetoj ?

5. Verki originale

Ŝajnas pli facile : almenaŭ la aŭtoro ne bezonas asimili alies penson kaj sin trudi por resti al ĝi kiel eble plej fidela.

Ni distingos verajn kaj falsajn originalojn. Mi nomas falsa originalo, evidente, tekston unue verkitan en nacia

lingvo kaj poste esperantigita de ĝia aŭtoro. Tio povas esti bona ekzerco (kaj helpi la aŭtoron por pli bone kompreni sin mem), sed ĝi restas traduko.

Same se la aŭtoro ne skribis, sed pensas nacilingve, kaj mense tradukas frazon post frazo. Vera originalo devas esti pensita senpere en esperanto. Nur pri tiaj ĉi tie temas.

Por verki bonan originalon, necesas unue : havi ion por diri. Kial ŝviti super teda tasko, se la temo ne valoras la penon ?

Ankaŭ necesas, posedi bonan konon pri la gramatiko kaj la vortaro, sufiĉan kutimon pri ilia aplikado, kaj skrupulan singardemon. Ni reprenos tiun ideon en postaj "konsiloj" al verkemuloj.

6. Parenteze

El ĉio ĉi oni povas konkludi : tradukado kaj verkado en esperanto estas malfacilaj, kontraŭe al la gurdita "facileco" de la lingvo. Tio estas mia firma konvinko.

Kial do riski tiel danĝeran aventuron ?

Genio estas rarega, talento ne tre ofta. Ankaŭ en nia literaturo estas loko por mezkvalitaj produktoj - eĉ por sub-mezaj.

Cetere, laŭ kiuj kriterioj ni juĝus ? En kies nomo ni proklamus kondamnon aŭ malpermeson ? Kio rajtigus nin por malkuraĝigi bonvolulojn, kiuj sentas en siaj fingroj skribjukadon ?

Nia literaturo ankoraŭ ne suferas troabundon. El multaj provoj, inter pluraj fiaskoj, iafoje povas elstari unu sukceso.

Ni ne timu tro multigi la semojn : ĉe la rikolto, la publiko estos al suverena juĝisto. Ĝi sola apartigos la tritikon disde la lolo ; ĝi sola decidus, kiu verko restos, kiu dronos en forgeso.

Do ĉiu, kiu sin opinias kapabla, sentime provu - kondiĉe nur, ke li ne fuŝu la lingvon. Por eviti tiun danĝeron, utilos kelkaj konsiloj (se ne tro pretende kaj aroge de mia flanko).

7. Konsiloj al verkemuloj

Por progresi en la lingvoscio, poluri kaj fluigi sian stilon, ne ekzistas pli efika recepto ol jena : nutri sin per diligenta legado de nia klasika literaturo. Unue la **Fundamento**, la **Fundamenta Krestomatio**, kaj ĉio subskribita aŭ elektita de Zamenhof. Poste Grabovski, Kabe, de Beaufront, Boirac, Cart... Kaj la modernaj bonaj aŭtoroj, kies nomlisto estus tro longa en tiu ĉi jam tro longa artikolo. Inter ili Lanti

okupas pli ol honorindan lokon.

Oni apliku apartan atenton al la aktoj de la Lingva Komitato kaj de la Akademio de Esperanto. Oni legu kaj relegu la "**Lingvaj Respondoj**" kaj la "**Proverbaro**". Oni elsuĉu la sukriĉan medolon de tiaj verkoj, kiaj :

"**Esprimoj de sentoj en Esperanto**" de Edmond Privat ;

"**La Homa Lingvo**" de W.E. Collinson ;

"**Fremdvortoj en Esperanto**" de P. Neergaard ;

"**Lingvo Stilo Formo**" de K. Kalocsay ;

kaj de Faulhaber :

"**Esperanta Mozaiko**" kaj "**Ne tiel, sed tiel ĉi**".

Oni ridu ĉe la spicaj humuraĵoj de nia karmemora R. Schwartz, kaj ludu per liaj ĵonglaj vortludoj. Ĵonglas ankaŭ kelkaj aliaj : Rotkviĉ, Lorjak, kc.; el la mino de la latentata potencio de nia ankoraŭ juna lingvo, tiuj elfosadas brilajn gemojn.

Oni frandu la sukplenaĵojn "**Eseojn**" de Waringhien. Oni eĉ kuraĝe alfrontu la timigan, iomete kaprompan studadon de "**Plena Gramatiko**" kaj de "**Parnasa Gvidlibro**"...

Legante, oni tenu ĉiam man-atingeblaj vortaro(j)n kaj gramatiko(j)n ; kaj notlibreton, kaj kraĵonon en la mano, por noti ĉion rimarkindan : nekonatan vorton aŭ esprimon, gramatikan eraron, dubaĵon, malfacilaĵon, aplikon de prepozicioj, belajn stilaĵojn, ktp. Poste, oni ordigu metode la notojn kaj komparu unu aŭtoron kun alia. Tiel kreskas la instrua materialo kaj la scio de la studanto. Estas konsilinde pretigi notojn aparte de la verkoj de Zamenhof por kompari ilin kun tiuj de aliuloj. Tiel oni fine kapablas distingi (*) la bonajn stilistojn disde la malbonaj.

Skribante, oni ofte konsultu vortarojn, gramatikojn kaj personajn notojn, kaj submetu sin al severa memkontrolado. Tiu konsilo validas por la traduklaboro, sed ankaŭ por la originala verkado, en kiu oni pli facile inklinaĵojn ĝin neglekti. Krome, ĉe originala verkado, ekzistas la danĝero, ke oni ĉirkaŭvelas (**) facilaĵojn, kaj ofte elektas plej simplan formon - aŭ plej similan al tiu de sia gepatra lingvo, eĉ pli senkonscie ol ĉe tradukado.

Ofta legado de verkoj de diversnaciaj aŭtoroj, de diverslandaj kaj tutmondaj gazetoj kaj revuoj, korespondado kun alinacianoj, estas bonegaj ekzercoj por alproprigi al si la ĝustan stilon, kiu estas nek nederlanda nek franca, nek rusa nek japana, sed simple esperanta.

(*) J. van Scheepen skribis "distili" : figuro aŭdaca, sed elvokiva.

(**) alia elvokiva esprimo de J. van Scheepen.

Ekzercu vin ankaŭ en parolado : flua konversacio helpas por akiri fluan skriban stilon. Laŭte legu viajn skribitajn frazojn : tiel vi pli facile kontrolos, ĉu ili estas facile kompreneblaj, facile prononceblaj kaj sufiĉe belsonaj ; pli fidu la orelojn ol la okulojn. Aŭskultu diskojn de Ramona, kaj kantu kun ŝi. En grupkunvenoj, prezentu eksponojn, partoprenu en diskutoj, ludoj, komedietoj . Resume : streb-
adu al maksimuma praktiko.

*

Ĉu sufiĉas tiu persona perfektigado ?

Senhezite mi respondas : ne !

Eĉ plej klera, sperta kaj lerta povas foje erari. Eĉ plej skrupula esploro povas preterlasi idiotismon. Submeti sian manuskripton al kontrolo de aliaj - eĉ malpli kapablaj - kaj precipe de alilingvanoj, estas neniel humilige, kaj povas esti tre utile.

Tro ofte ni devas konstati, ke iu publikigita libro povus esti, per tia kontrolo, plibonigita en sia formo gramatika aŭ leksikologia.

Unu el niaj plej kapablaj verkistoj, kun plej eleganta stilo, komence malinklinis allasi sian prozon al alies kontrolo ; ne senhezite li konsentis sendi manuskripton al nia Literatura Komitato ; sed poste, li afable akceptis kelkajn korektojn kaj sugestojn, kaj fine li bonvolis konkludi, ke la afero entute estas bona.

Sciu la verkistoj kaj eldonistoj, ke nia kontrolista kolegaro estas ĉiam servopreta, kun plena respekto al la rajtoj de la aŭtoro. (Vd. Anekson).

8. Historio kaj prognozo

Mi proksimiĝas al fino de tiu ĉi skizo, jam tro longa, kvankam mi flankelasis aŭ apenaŭ tuŝetis plurajn aspektojn de la temo. Por ekzemplo, mi ne menciis la gravan kontribuon al esperanta literaturo de gazetoj kaj revuoj, eĉ efemeraj : **La Esperantisto, La Revuo, Esperanto, Heroldo, Literatura Mondo, la Praktiko, Sennacieca Revuo, Oomoto, la Revuo Orienta, La Pirato, La Vipo, Herezulo, la Nica Literatura Revuo, Norda Prismo**, kc.

Mi tamen deziras ankoraŭ pritrakti per larĝaj trajtoj la historion de la esperanta literaturo dum la unua duon-jarcento de ĝia ekzistado, ĝian evoluon de post la dua mondmilito, kaj, en la lumo de ĝiaj nunaj tendencoj, provi antaŭvidon pri ĝia estonteco.

De 1887 ĝis 1940, krom kelkaj esceptoj, nia literaturo estis precipe influita de la okcidenta kulturo, heredaĵo de la helena-greka kaj, pere de la Biblio, de la hebrea-kristana.

En la daŭro de tiuj 53 jaroj, la torĉo de la literaturo, pli-malpli ligate kun tiu de la movado, pasadis de unu lando al alia. Oni povis paroli pri periodoj rusa-pola, germana, franca (inkluzive de franclingva Svisio), hungara (ĉefe budapeŝta, la brila epoko de "**Literatura Mondo**"), flandra-nederlanda, angla-skota...

Jam en tiu tempo, ekster tiuj plej aktivaj centroj, dise laboris izolitaj verkistoj : en Hispanio, Skandinavio, Balkanlandoj, Norda kaj Latina Amerikoj, Hindio, Japanio...

*

Inter la du mondmilitoj plimultiĝis la verkistoj sur pli kaj pli diversaj lokoj. La areo de nia literaturo disvastiĝis al la tuta okcidentkultura mondo. Ĝi kovris tutan Eŭropon de Laplando al Mediteraneo, de Portugalio al Maroj Nigra kaj Kaspia ; tutan Amerikon de Nordo al Sudo ; Aŭstralion, Novzelandon, Kanariajn Insulojn.

Momente haltigita dum la dua mondmilito, tiu movado tuj poste reakceliĝis. En Ekstrem-Oriento aperis taĉmento da bonegaj japanaj verkistoj. Ĉinio, de kie jam antaŭ 1914 venis "**la Voĉo de l'Popoloj**", revekiĝis, dum vekigis Koreio kaj Vjetnamio.

Pli kaj pli intensiĝas tiu discentriga tendenco. El Hindio venis ne nur studoj pri Budao kaj Budaismo, pri la Bahaisma movado, pri Kriŝnamurti, sed ankaŭ ampleksa traduko el sanskrito de la monumenta Bagavadgito. En Proksima Oriento, la esperanta literaturo ekokupis postenojn ne nur en Izraelio; ĝi ankaŭ komencis ekspluati la riĉan minon de la islama kulturo : traduko de la **Korano**, de klasikaj iranaj poetoj (Omar Kajjam), de moderna araba poeto Ĥalil Ĝibran... Nova kampo, ankoraŭ vaste plugenda grundo.

Oni povas konjekti, ke tiu tendenco plu daŭros kaj disvolviĝos. Tamen, ĝis nun, restas gravega manko : vastega kontinento preskau tuta ekster la disvastigo de nia lingvo kaj, konsekvence, de ĝia literaturo. Esperanto apenaŭ ekpenetris en la randojn de Afriko kaj en kelkajn punktojn de ties parto. Tiu malfavora situacio ne devus plu longe daŭri.

Apud siaj indiĝenaj, originalaj kulturoj, la eks-kolonioj restas influitaj de la okcidenta pere de eŭropaj lingvoj,

respektive : angla, franca, nederlanda, portugala, hispana, itala, germana. En tiuj landoj sidas ankoraŭ nun kiel kunlaborantoj eŭropaj edukistoj, kuracistoj, flegistoj kaj diversaj helpantoj. Kaj tiuj landoj sendadas el siaj gefiloj kiel studentoj en eŭropajn universitatojn. Tra tiuj kanaloj, pere de tiuj kontaktoj kaj interŝanĝoj, ni devus eltrovi rimedojn por propagandi nian lingvon en Nigra Afriko samkiel en Magrebo kaj Egiptio, se ne paroli pri anglalingva Rodezio kaj afrikansa Sudafriko. Ni devus riĉigi nian literaturon per alporto el la buntaj kulturoj de tiuj landoj.

Mi pensas interalie pri propagando farebla inter afrikanaĵ studentoj en Francio, precipe inter studentoj pri beletristiko, per la broŝuro de Waringhien "**ABC de esperanto por la uzo de beletr-amantoj**" (*) (franclingva, kiu indus esti adaptita en ĉiujn grandajn kulturlingvojn.)

Grava misio atendas la esperantan literaturon. Ĝi devas alproprigi al si ĉiujn gentajn kulturojn, ilin diskonigi, komence, pere de multigitaj grandaj antologioj laŭ la modelo de la jam ekzistantaj (hungara, ĉina, angla, kc). Ne nur diskonigi tiujn kulturojn, sed ilin asimili, kaj ilin integri en vasta sintezo sennacieca.

Tiam ĝi estos kiel Pegazo en poemo de la Flandra franclingva poeto Verhaeren. La flugilhava ĉevalo, naskita sub la helena ĉielo, flugante pli kaj pli alten, vidas sian horizonton plivastiĝi. Ĝi malkovras laŭvice pli kaj pli malproksimajn poeziajn terojn...

..."Kaj de tiam la tuta mondo estis ĝia areno."

(*) "ABC d'esperanto à l'usage de ceux qui aiment les lettres".

Aneksa :

Regularo de la Literatura Komitato de SAT

1. La Literatura Komitato havas kiel taskon, laŭ lingvo kaj stilo kontroli la de SAT, LEA-oj aŭ eĉ privataj personoj publikigotajn verkojn.
2. Manuskriptoj estu kontrolataj nur tiukaze se eldonisto garantias ilian aperon.
3. Antaŭ ol decidi, ĉu iu verko povas esti kontrolata, okazu prova kontrolo ampleksanta 10-20 paĝojn.
4. La poŝta forsendo de la manuskriptoj okazu ĉiam registrite.
5. Tuj post ricevo de manuskripto la ricevinto konfirmu al la forsendinto la ricevon.
6. La manuskriptoj estu kontrolataj de almenaŭ 2 personoj, el kiuj almenaŭ 1 ne apartenu al la nacia lingvo de la aŭtoro aŭ tradukinto.
7. Post la kontrolo de tiuj du personoj, la estraro de la Lit. Komitato komparu la faritajn rimarkojn kaj eventuale decidu inter du diversaj konceptoj de la kontrolintoj kaj cetere zorgu pri la unueco en la verko.
8. La faritaj rimarkoj estu nur proponoj al aŭtoro aŭ tradukinto. Neniu ŝanĝo okazu sen aprobo de ĉi tiuj. Se la aŭtoro aŭ tradukinto persistas pri iu formo, kiun la Lit. Kom. malaprobis, ĝi estu presata kun tiurilata rimarko de la Lit. Kom. (malantaŭe en la libro). Se la kvanto da tiaj formoj estas tro granda aŭ la formoj rekte kontraŭfundamentaj, la verko ne ricevu la aprobon de la Lit. Kom.
9. La Lit. Kom. ricevu la duan presprovon de la kontrolita verko.
10. La kontrolo ampleksu gramatikon kaj stilon, sed ne la konformecon de la traduko al la originalo. Pri ĉi lasta la tradukinto restu plene responda. Nur ĉe dubo pri la ĝusteco de iu vorto, frazo aŭ esprimo ĝi rilatu pri tio kun la tradukinto.
11. Se la kvanto da ŝanĝoj estas tioma, ke oni ne plu povas konsideri ĝin kiel laboron de la aŭtoro aŭ tradukinto, sed kiel de la Komitato, la Lit. Kom. ĉesigas la kontrolon kaj redonos la manuskripton.

Glosa

- Vortoj ne troveblaj en PV kun suplemento, sed troveblaj en PIV :
afrikansa apreci aŭ aprezi lido elvokiva (ĉe -iv) etno
- Propraj nomoj esperantigitaj laŭ PIV :
Bagavadgito, Betoveno, Danto, Goeto, Homero, Magrebo, Moliero, Pegazo, Platono, Rabelezo, Sofoklo, Ŝekspiro, Ŝillero, Vagnero, Vergilio, Voltero.
Ne en PIV : Cervanteso, Ŝuberto, Tolstojo.
- alies : troviĝas en PV kaj en PIV, kvankam la tuta serio "alio + alies" estas "kontraŭregula" (Zamenhof), "ne tute korekta" (PV), kaj el ĝi nur "alies" estas "maksimume aliesbla" (PIV). Tamen "alies" enradikiĝis en la praktiko, anstataŭ "alies", regule formita, sed fakte ne uzata.

Teksto represita el "Sennacieca Revuo", jaro 1979
Imprimeur : C.Baudé, F 47340 Laroque Timbaut